ESPERANTO

sub la suda kruco

marto 2026





ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIOJ
Volumo 33[1] numero 161 marto 2026

Presita de CMYK Colour Online en Melburno, Aŭstralio
Redaktisto: Terry Manley
Provlegantoj: Donald Rogers, Trevor Steele, Nicole Else
Kunordigisto: Jonathan Cooper
Kontaktadreso: esk@esperanto.org.au

AEA – ESK
GPO Box 2122
Melbourne, Victoria 3001
Australia

Abonoj kaj pasintaj numeroj
Esperanto sub la Suda Kruco estas sendata al membroj de la Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEA).

Por informoj pri abonoj, pasintaj numeroj, kaj pri membriĝo al la asocioj:
AEA: **esperanto.org.au** / **info@esperanto.org.au**
NZEA: **esperanto.org.nz** / **esperantonewzealand@gmail.com**

Kiel kontribui al Esperanto sub la Suda Kruco
Sendu eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunkto, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan kontribuon al nia kontaktadreso, **esk@esperanto.org.au**

Artikoloj kaj originalaj en Esperanto kaj tradukitaj en Esperanton estas akcepteblaj. Sed NE sendu permaŝinajn tradukojn (ekzemple per Google Translate).

Limdato por kontribuoj por la sekva numero
1a de majo 2026

La redaktistoj rajtas redakti, korekti, mallongigi kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo.

Por la opinioj aperantaj en ĉi tiu eldonaĵo respondecas la aŭtoroj. Ili ne necese spegulas la opiniojn aŭ de AEA aŭ de NZEA.

Copyright @ 2026 AEA & NZEA – ĉiuj rajtoj rezervitaj
ISSN 1038-9380

SUR LA KOVRILO: *David Ryan rigardas Aŭklandon*, de Helen Palmer, gajninto de la unua premio en la kongresa fotokonkurso. Vidu paĝon 30.

ENHAVO

Antaŭparolo	04
Kiel aĉeti kastelon (aŭ gajni UK-on)	05
La kataluna lingvo	07
Sunreĝoj	09
Ho, mi vere nun estas plenkreskulo	09
La knabino kun la longa hararo (8)	10
Poeziangulo	12
Biologio en numeraloj	13
Vizito al stranga lando	14
Langotordiloj	15
Intervjuo kun Moisés Herrera Barrera	16
Sagrada Família	17
Manĝarbaro: solvo al multaj problemoj	19
Kuriozaj mapoj	22
Protokolo de la jarkunveno de AEA	25
El la regionoj	28
Fotokonkurso-gajnintoj	30

Antaŭparolo

TERRY MANLEY

En decembro atingis mian retadreson, "Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 1270", kun la sekvaj eroj:

LA 112a UK OKAZOS EN 2027 EN MELBURNO/NARRM, AŬSTRALIO!

La Estraro de Universala Esperanto-Asocio (UEA) kun ĝojo anoncas, ke la 112a Universala Kongreso de Esperanto (UK) okazos en Melburno/Narrm, Aŭstralio, de la 3a ĝis la 10a de julio 2027. Post la sukcesaj kongresoj en Montrealo (2022), Torino (2023, Aruŝo (2024), Brno (2025) kaj Graz (2026), la movado denove transpaŝas kontinentojn por festi sian plej gravan jaran renkontiĝon.

La UK en Melburno havos apartan signifon: ĝi estos nur la duan fojon en Oceanio post la memorinda kongreso en Adelajdo en 1997, tiel ĝuste 30 jarojn poste la Esperanto-movado revenos al la kontinento! Tiu reveno simbolas la forton kaj daŭripovon de la internacia lingvo kaj montras la engaĝiĝon de UEA por certigi, ke la UK estu vere tutmonda.

UEA kun respekto agnoskas, ke Melburno/Narrm estas la tradicia tero de la Kulina nacio. La regiono, kies tradicia nomo en la lingvoj Woiwurrung kaj Boonwurrung estas skribata respektive kiel *Narrm* aŭ *Naarm*, estas hejmo de aborigena historio de almenaŭ 40 000 jaroj. La tradicia nomo reflektas profundan kulturon kaj ligon al la tero, akvo kaj kreorakontoj.

Ĉu ankaŭ vi partoprenos? Pro specialaj subvencioj akiritaj de la lokaj organizantoj kaj la Kongresa Fako, la kongresdato estos iom pli frua ol kutime: la 112a UK okazos de la 1a ĝis la 8a de julio 2027. UEA rezervos ekskluzivan rabatitan kotizon por tiuj partoprenantoj, kiuj ĉeestos la 111an UK en Graz kaj tuj dum ĝi aliĝos al la 112a UK en Melbourne/Narrm. Tiel oni volas doni pli da oportuno al fidelaj kongresanoj, kiuj ĉeestas sinsekvajn UK-ojn. La reta aliĝilo por la 112a UK aperos komence de la 111a UK en Graz. Se vi ankoraŭ ne aliĝis al la 111a UK, ne maltrafu la okazon facile aliĝi per nia reta aliĝilo: **uk.esperanto.net**

Sur la sekvaj paĝoj vi legos artiklolon de Joanne Johns, pri tio kiel ĉi tiu afero evoluis. Joanne jam multon faris por progresigi la aferon kaj nun serĉas tiujn kiuj pretas iel helpi pri la UK. Kontaktu al ŝi ĉe **navear@gmail.com** por ricevi formularon por volontuli.




Dorota Rodzianko de UEA en la Ŝtata Biblioteko de Viktorio

Kiel aĉeti kastelon (aŭ gajni UK-on)

JOANNE JOHNS (MELBURNO)

Je la 3a de marto 2025, mi ricevis malgrandan retmesaĝon, kiu metis nin sur la vojon gastigi la Universalan Kongreson de 2027 en Melburno. Ĝi venis de la Melburna Kongresa Buroo (MKB), kaj demandis, ĉu "eble interesus vin esplori proponon [gastigi la UK-on] por estonta jaro, kun la subteno de MKB". Mi legis ĝin, kaj sendis ĝin tuj al la aliaj estraranoj de AEA por peti iliajn pensojn. Mi kredas, ke ni ĉiuj havis similajn pensojn al Sandor, kiu havis dubojn, sed respondis "valoras viziti belan kastelon eĉ se vi ne povas aĉeti aŭ eĉ lui ĝin". Do mi aranĝis kunsidon kun MKB por aŭdi, kion ili proponis.

Laŭ ili, financa subteno haveblus el la registaro, se ni plenumus kelkajn postulojn, kiuj ŝajnis fareblaj al ni – ekzemple, ke la kongresejo estu la Melburna Kongresa kaj Ekspozicia Centro (MKEC). Do, zorge trempante niajn piedfingrojn pli kaj pli profunden en la tutan ideon, ni demandadis, renkontiĝadis, diskutadis, ĝis ni trovis nin en plena preparado de oficiala propono. Dankeme, la MKB faris la plejmulton de la laboro, kreante tre okulfrapan kaj profesian retejon por nia propono. Ni nur devis traduki ĝin en Esperanton.



Peter Balaz, Joanne Johns, Heather Heldzingen kaj Dorota Rodzianko vizitas Besto-rifuĝejon Healesville

Post la prezento de nia finita propono en septembro, ni devis aranĝi viziton al Melburno por du reprezentantoj de la UEA, nome Dorota Rodzianko kaj Peter Balaz. MKB aranĝis la vojaĝon, loĝadon kaj itineron. La lokaj Esperantistoj nur devis kunesti dum ĉiu programero kaj certigu, ke niaj gastoj ĝuis siajn spertojn.

Ili alvenis dimanĉon la 2an de novembro vespere; tiu tago estis 31°C. La venonta tago estis 16°C kaj pluvadis. Poste estis bela tago, sed je la semajnfino refoje pluvis. Do ili ja spertis la ŝanĝiĝemon de melburna vetero!

Lundon ni vizitis la proponitan kongresejon (MKEC), hotelon, kaj du eventspacojn. Ni renkontiĝis por nia kutima lunda kunveno, kie niaj gastoj renkontis la aliajn melburnanojn, kaj malavare donis al ni kelkajn librojn. Ni ankaŭ bonvenigis gaston de Francio, Maxime, kiu ĵus biciklis laŭ la Granda Oceana Vojo!

Mardo estis publika ferio pro la Melburna Pokalo (landfama ĉevalkonkurso), do ni aranĝis tradician kradroston ĉe Heather kaj spektis la konkurson. Dorota kaj Peter ankaŭ tie havis la oportunon unuafoje gustumi Pavlova-kukon.

Daŭras **>**

Merkredon ni renkontiĝis por promenado tra la urbo, gviditaj de loka profesia gvidistino. Ni vidis multon el la vidindaĵoj de la urbocentro (sed ne ĉiuj), kafumis, kaj gustumis ĉokoladojn. Heather multe laŭdegis multajn melburnajn allogaĵojn (kafon, ĉokoladon, futbalon, ktp), kaj rapide iĝis ŝerco inter ni, ke Melburno havas multege da "plej bonaj" aferoj (sed ĝi serioze ja havas!).

Ĵaŭdon iu de MKB ŝoforis nin al la Valo Yarra. Ni vizitis la bestoĝardenon ĉe Healesville kaj vidis la kutimajn aŭstraliajn bestojn, la malsanulejon por bestoj kaj la bird-spektaklon, kie multaj birdoj flugis super niaj kapoj, treege proksime. Ni poste iris al vinfarejo Rochford, por gustumi vinojn kaj tagmanĝi. Estis granda tago, kaj mi kredas, ke krom la ŝoforo, ni ĉiuj dum parto de la vojaĝo hejmen endormiĝis.

Ni ankaŭ iris al Eureka Skydeck (observejo). Dorota tre ŝatis ĝin, ĉar estis du aldonaj "spertoj" – unu virtuala realeco, dum kiu oni vidas kelkajn vidindaĵojn de Melburno (en speciala moviĝanta seĝo), kaj "The Edge", vitra skatolo kiun vi eniras, kaj ĝi moviĝas ekster la muroj de la konstruaĵo. Peter iom timas altecojn, sed li bone sukcesis fari ĉion kun ni.

Je vendredo, ni inspektis ses pluajn hotelojn (en ĉiu ni vidis almenaŭ kvar diversajn ĉambrojn, kaj la eventspacojn, kaj la restoracion, kaj kaj kaj...). Miaj piedoj komencis plendi jam en la mateno. En la posttagmezo ni iris al St Kilda, kaj promenis laŭ la plaĝo kaj kajo, antaŭ ol reveni al la urbocentro kiam la vetero malboniĝis. Vespere mi lasis niajn vizitantojn esplori la urbon laŭplaĉe (ĉar ĝi estas la plej bona kaj memorinda maniero por sperti Melburnon, laŭ mi), kaj ili promenadis eĉ pli.

Sabaton ni iris al la bazaro Queen Victoria, por butikumi. Tie troviĝas multegaj diversaj turistaj memoraĵoj, inter kiuj Dorota trovis dorsogratilon farita el kangurua brako, kaj botelmalfermilon farita el kanguruaj testikoj. Kiel vegetarano ŝi estis kompreneble ŝokita (sed ne tro por tuŝi ilin). Do mi devis klarigi, ke en partoj de Aŭstralio estas tro da kanguruoj, kaj ke aŭstralianoj havas strangan senton de humuro.

Nia lasta komuna tago estis dimanĉo, kaj tiam ni iris al la botanikaj ĝardenoj por gvidita ekskurso "promeno pri aborigena heredo". Ni gustumis indiĝenajn plantojn kaj lernis iom pri la historio de la loko. Je la fino, la ĉiĉeronino montris al ni tradiciajn posumajn (falangerajn) peltojn, kiujn ili historie uzis por vindi bebojn. Mi ĝojis, ke ni jam vizitis vivantajn indiĝenajn bestojn, aŭ eble niaj gastoj pensus, ke ni mortigas ion ajn kio moviĝas.

Ni adiaŭis niajn novajn amikojn dimanĉon, kaj poste povis nur atendi novaĵon. En frua decembro venis la anonco, ke nia propono sukcesis! La kastelo estos la nia en 2027. Nun venas pli da laboro, sed espereble kundividita inter niaj multaj amikoj.



Heather, Joanne, Peter kaj Dorota ĉe "The Edge", Eureka Skydeck

La kataluna lingvo

DAVID RYAN (WELLINGTON)

Mi komencis lerni la hispanan lingvon kiam mi estis 15jara knabo. Iom poste mi lernis la portugalan. La skribaj hispana kaj portugala lingvoj estas tre similaj kaj lerni la portugalan post la hispanan ne estis tiom malfacile. En 1986 mi vojaĝis al Eŭropo por ĉeesti internacian kongreson de universitataj studentoj, sed mi profitis tiun vojaĝon por viziti mian Esperantistan plumamikinon en suda Hispanio. Mi iris per nokta trajno de Francio kaj alvenis al Barcelono por pasigi tie kelkajn horojn antaŭ la foriro de mia trajno al suda Hispanio.

En centra Barcelono mi vizitis faman butikon, El Corte Inglés, kiu similas al David Jones aŭ Myer. Tie mi vidis reklamojn evidente pri malaltaj prezoj. Mi ne memoras la vortojn sed probable temis pri "*Preus més baixos*". Kio okazas? Tiuj vortoj certe ne troviĝas en la hispana lingvo kiun mi lernis en Nov-Zelando! Tiam mi pensis ke eble tiuj vortoj povas esti en la portugala lingvo ĉar ili similas al la hispana ("*Precios más bajos*"). Mi pensis ke eble iras multaj turistoj de Portugalio al Barcelono kaj la butiko bonvenigas ilin per uzo de la portugala lingvo. Tamen, poste oni informis min ke temas pri vortoj ne en la portugala sed en la kataluna lingvo. Tiutempe mi eĉ ne sciis ke tiu lingvo ekzistas!



Informo en la subtera trajno en kataluna, hispana, kaj angla

Fakte, en Hispanio oni parolas multajn lingvojn. Ekzemple, en la nordokcidenta regiono de Galego, estas 2–3 milionoj da homoj kies denaska lingvo estas la galega (mi vidis tion kiam mi vizitis Galegon en 2024). Alia provinco, Eŭskio, estas fama ĉar tie proksimume 900 000 homoj parolas la eŭskan kaj por eŭskaj naciistoj, kiuj volas sendependecon, la eŭska lingvo gravas. Tamen, la regiono kie pli da homoj ne parolas la hispanan estas Katalunio en la nordorienta parto de Hispanio, apud la landlimo kun Francio, kvankam la pli vasta katalunalingva regiono estas ne nur Katalunio, sed ankaŭ partoj de aliaj najbaraj provincoj kaj hispanaj insuloj, suda Francio, kaj eĉ parto de la itala insulo de Sardio. Menciindas ankaŭ, ke la kataluna estas la sola oficiala lingvo de Andoro, eta lando kun 80 000 enloĝantoj en la Piranea montaro inter Katalunio kaj Francio.

La kataluna, latinida lingvo kiel la

Daŭras **>

hispana, havas proksimume 10–12 milionojn da parolantoj. La lingvo naskiĝis baze de la vulgara latina lingvo, verŝajne ekde la 9a jarcento. La vortstoko estas plimalpli simila al tiu de la hispana, kvankam kelkaj vortoj estas tute malsimilaj. Laŭ mi, iu, kiu parolas la hispanan povas kompreni la katalunan, kaj aldona scio de la franca kaj itala helpas. La kataluna lingvo ĝuis grandan prestiĝon sed, kiam en la 15a jarcento, nobeloj preferis uzi la kastilian lingvon de centra Hispanio, la kataluna komencis perdi sian influon. Multajn jarojn poste, la lingvo estis malpermesita dum la diktaturo de Franko. Post lia morto en 1975, la lingvo reakiris oficialan statuson (kune kun la hispana) en Katalunio en 1979.

Tial, dum mia antaŭnelonga vizito, mi volis scii ĉu oni vere parolas la katalunan en Barcelono aŭ ĉu temas pri loka lingvo, kiu batalas malsukcese kontraŭ la pli forta hispana lingvo.

Je oficiala nivelo, oni vidas la katalunan preskaŭ ĉie en Barcelono – en registaraj oficejoj, en subtera trajno, en stratindikiloj, ktp. Tamen, ĉu tio signifas, ke oni vere uzas la lingvon? Tra la mondo estas multaj landoj, kie regionaj registraroj elspezas multan monon por provi (re-)vivigi lokan lingvon, sed oni vere ne uzas la lingvon por ĉiutagaj aferoj. Pro tio, ege interesis min kiam mi vidis ke butikoj, bankoj, kaj komercaj oficejoj en Barcelono uzas la lingvon. Ili scias ke ili devas komuniki en lingvo, kiun siaj klientoj preferas uzi. Tial, laŭ mia kalkulo, mi vidis, ke en Barcelono oni uzas la katalunan en proksimume 70% de indikiloj, reklamoj, instrukcioj ktp (kaj la hispanan en 30%).

Mi uzas la vorton "vidis" ĉar mi nur vidis la skribitan katalunan pro la fakto, ke mi ne ofte trovis min en lokoj, kie mi povas aŭdi la katalunan. Mi certe aŭdis, ke oni uzas la katalunan, ekzemple kiam oni anoncas en la subtera trajno, en vico kiam oni aĉetas bileton por eniri muzeon, kiam instruistoj parolis al grupoj de lernejanoj, kaj kiam familianoj promenas laŭ la strato. Tamen, kvankam mi certe aŭdis kaj la katalunan kaj la hispanan, mi ne povis kalkuli kiel ofte oni parolas la katalunan aŭ la hispanan.

Laŭ oficialaj statistikoj (en 2023), 94% de la loĝantaro de Katalunio kun pli ol 15 jaroj komprenas la katalunan, 80% povas paroli, 84% povas legi, kaj 66% povas skribi ĝin. La kataluna estas la ĉiutaga lingvo por 33% de enloĝantoj de Katalunio kun pli ol 15 jaroj, 9% uzas la katalunan kaj hispanan, kaj 47% diras, ke la ĉiutage uzata lingvo estas la hispana. Onidire, uzo de la kataluna estas relative malalta en Barcelono kompare kun aliaj lokoj en la pli vasta katalunalingva regiono. Barcelono estas internacia urbo kiel Parizo, Londono, Amsterdamo ktp. Alvenas eksterlandaj turistoj kaj laboristoj kaj homoj el aliaj regionoj de Hispanio. Ili certe ne parolas la katalunan je alveno. Ili parolas la hispanan, anglan, aŭ lingvojn de enmigrantoj kiel la araban. Pro tio, oni klarigis al mi, ke oni uzas la katalunan pli ofte ekster Barcelono, kaj en kelkaj lokoj la kataluna estas la sola lingvo kiu parolatas. Mi certe vidis tion. Mi vizitis Ĝironon, urbeton iom norde de Barcelono kaj tie mi vidis pli da uzo de la kataluna.

Kia estos la estonteco de la lingvo? Nuntempe, oni instruas ĉefe en la kataluna en lernejoj en Katalunio kaj estas televidaj kaj radiaj stacioj en la kataluna, ktp. Pro tio, la kataluna estas grava lingvo. Ofte oni parolas pri sendependiĝo de Katalunio kaj, se tio okazus, la kataluna estus oficiala lingvo de eŭropa lando kun pli da parolantoj ol tiuj de aliaj naciaj lingvoj, ekzemple la islanda, slovaka, dana, bulgara, estona, sveda, ktp.

Sunreĝoj

TREVOR STEELE (ADELAJDO)

En 1996 aperis *Full Disclosure* (Plena senvualigo) de Andrew Neil, iama ĉefredaktisto de *Sunday Times* de Londono. Neil do laboris kiel dungito de Rupert Murdoch, kaj liaj ĉapitroj donas kredindan bildon de tiu kruela, punema, ambiciega, inteligenta tirano, fondinto de vastega inform-imperio (kelkaj dirus "misinform-imperio"). Unu ĉapitro de la libro de Neil havas la titolon "Ĉe la kortego de la Sunreĝo" – aludo al la franca Louis XIV, unu el la plej absolutaj reĝoj de la eŭropa historio.

Kiam oni laboras por Rupert Murdoch, oni ne laboras por kompaniestro aŭ ĉefmanaĝero: oni laboras por Sunreĝo. Oni ne estas direktoro aŭ manaĝero aŭ redaktisto, oni estas kortegano ĉe la kortego de la Sunreĝo – premiata per mono kaj statuso de dankema Reĝo, dum oni plenumas liajn celojn; absolute elĵetita, kiam oni ĉesis plaĉi al li aŭ pretervivis sian utilon.


La tuta vivo orbitas ĉirkaŭ la Sunreĝo: ĉia aŭtoritato venas de li. Al li sola oni ŝuldas lojalecon, kaj li atendas, ke lia regno disvastiĝu ĉien, lia vorto estas definitiva. Ĉiuj aferoj estas deciditaj nur de li. Li estas la sola decidanto, kaj ĉiu iom grava homo raportas rekte al li. Normalaj manaĝeraj strukturoj – ĉiuj tradiciaj ĉenoj de aŭtoritato, komunikado, kaj decidado en moderna komerca korporacio – ne gravas. Gravas nur la Sunreĝo.

Legante tion, mi vole-nevole pensis pri alia homo, kiu deziras esti "Sunreĝo". Ĉu legantoj divenas, pri kiu mi skribas? Eble baldaŭ estos heroa batalo inter du tiaj reĝoj.

Ho, mi vere nun estas plenkreskulo

WILLIAM GEORGESON (TRARALGON, VIKTORIO)

Dum mi feriis en Nov-Zelando post nia kongreso, mi mendis libron de la interreto. Ĝi temas pri la indiĝenaj lingvoj de Aŭstralio, estas rekonstruo de teoria pralingvo de ĉiu lingvo de la ĉefa lando de Aŭstralio (*Proto-Australian: Reconstruction of a Common Ancestor Language*, de Mark Harvey kaj Robert Mailhammer), kaj ĝi alvenis la matenon post mia reveno . Mi kompreneble estis tre ekscitita, sed ĝi memorigis min pri la unua fojo kiam mi estis tre feliĉa ricevi libron pri tia lingvistika temo; estis gramatiklibro de la anglosaksa lingvo, kiun mi ricevis por mia 19a naskiĝtago, en 2018. Tiam, mi pensis al mi, ho, mi vere estas plenkreskulo nun. En la pasintaj jaroj mi ne havis tiom da "akademiaj" interesoj, kaj por mi nun esti ege feliĉa pri libro pri tia temo sonis strange! Ĉu aliaj homoj memoras specifan momenton kiam vi unue pensis simile, kiam vi rimarkis, ke vi ja fariĝis plenkreskulo?



Elĉerpaĵo 8 el membiografio de Catherine Gluck:
La knabino kun la longa hararo

TRADUKITA DE TERRY MANLEY (ARMIDALE, NSK)

Iom pri la verko: En 2023, kiam mi vizitis Esperanto-Domon en Sidnejo, mi rimarkis sur tablo libreton neimponan. Trafoliante ĝin, oni ne trovas ligon al Esperanto escepte, ke Kep Enderby verkis la enkondukon por ĝi. Mi memoras la nomon de la aŭtorino, ĉar en la 1990aj jaroj ŝi heredigis sufiĉe grandan sumon al la Esperanto-Federacio de NSK. Do mi portis la libreton hejmen kaj post legado pensis, ke valoras traduki ĝin memore al Catherine Gluck.

Catherine naskiĝis en Hungario en 1906 kaj enmigris Aŭstralion en 1950. Jen iom el la traduko.

Decido forlasi Budapeŝton 1946

Frue en 1946 multaj homoj provis forlasi Hungarion kaj migri okcidenten. Kontrabandistoj promesis gvidi homojn de Hungario trans la aŭstran landlimon po 50 USD. Per la nigra merkato mi havis la monon. Mi donis ĝin al junulo, kiun oni rekomendis kiel fidindan kaj honestan. Mi devis doni ankaŭ oran ringon (kiun mi havis per la nigra merkato) al alia, kiu gvidos min trans la mallarĝan ponton al Buda kaj al la Stacidomo Déli Pályauduar je la unua matene. Alveninte, mi devis viciĝi en longa atendovico. Finfine iu puŝis min sur la trajnon. Alia junulo, kiun mi tuj rekonis kiel la filon de nia vestlavistino, kriis al mi, "Malsupren, Sinjorino Glück!" kaj fortiris min de la trajno. Mi havis nenian elekton ol reveni hejmen trompite, malfeliĉe kaj senespere. Bonŝance, la apartamento ankoraŭ apartenas al mi. Se mi nur povus doni kroman 50 USD al la viro, ili permesus min foriri, sed mi ne havis kroman 50 USD je tiu tempo. Kion fari? Mi ankoraŭ neŝanceleble deziris renkonti mian fraton en Parizo, iel ajn kaj kontraŭ iu ajn kosto. Mi ŝparis monon refoje kaj baldaŭ kontaktis alian kontrabandiston, al kiu mi donis oran ringon kiel transportan koston kaj 50 USD por transiri la hungara-aŭstran landlimon. Mi certis, ke mi povos iri de Vieno al Parizo. Kia naivulo! En tiu tempo mi estis sukcesa kaj bonŝanca. Kiam finfine la trajno moviĝis oni donis al mi bebon por brakumi ĝis ni transiris la landlimon. Mi neniam traktis bebon antaŭe, kaj ne sciis kion fari pri ĝi. Mi ne eĉ sciis kiel teni ĝin ĝuste per la brakoj. La bebo komencis plori kaj iuj demandis, ĉu ĝi estas knabino aŭ knabo. Mi ne sciis, kaj ne eblus ke mi povis eviti ĝenojn. Ankaŭ mi komencis plori. Mi devis stari en trablovata koridoro kun peza bebo en miaj brakoj. Mi sentis min, senespera, kaj tute sola. Neniu riskis paroli. Oni avertis nin, ke estos spionoj sur la trajno, kiuj farus ion ajn por havi nian monon.

Aŭstrio 1946

Finfine ni alvenis al la hungara-aŭstra landlimo kaj devis eltrajniĝi. Ne plu estis kontrabandistoj videblaj ie ajn. Ili jam rapide kaj kviete malaperis. Rusaj soldatoj staris sur unu flanko kaj aŭstraj kontrolistoj sur la alia flanko de la relvojo. Bonŝance, mi ankoraŭ havis iom da pano kaj kelkaj trančaĵoj da salamo, sed neniajn dokumenton aŭ identigilon. Kiam oni demandis al la aliaj vojaĝantoj,

kien ili iras, ĉiuj respondis “al Izraelo”. Mi estis naiva kaj diris al la landlimaj kontrolistoj, ke mi deziras iri al Parizo. Mi iĝis ridinda. (Neniu deziris iri al Izraelo, sed tia respondo estis la sola rimedo por transiri.)

La bebo komencis plori refoje. Ĝi devus esti malseka kaj malsata. Iu puŝis min kaj prenis la bebon for de mi. Fine mi estis sola. La rusaj soldatoj permesis nin trairi, sed la aŭstraj estis pli demandemaj. Mia germanlingva scipovo estis granda avantaĝo, ĉar neniu alia en la grupo scipovis la germanan. Oni petis min interpreti. Tiel mi bonŝance evitis trairi la identigan kontrolon. Oni sendis nin al provizora centro nomita La Hospitalo Rotschield. De tie oni arigis grupojn kaj direktis ilin sur trajnon irontan al Lintz, kiu estis la landlima urbo kaj fina rusa-aŭstra kontrolejo. Ĉe Lintz ni devis transiri mallarĝan, malgrandan ponton kun niaj identigiloj. Ni sciis, ke ni atingis lokon en Aŭstrio sed ne precize kie, kaj ne kiel pluiri el tiu loko. Per mia bona germana mi povis blufi por ke mi trairu la kontrolejon. Estis ŝancele ĉe multaj homoj, kiuj ne sciis kion fari.

Iĝis mallume kaj malvarme. Rimarkinte malplenan vagonon apudan kun malfermitaj pordoj kaj neniu ene, ni rapide eniris kaj enloĝiĝis. Ege laciĝantaj, ni baldaŭ ekdormis sur la planko. Tiam ni atendis miraklon. Mi havis nur mansakon kun malmultaj posedaĵoj, por uzi kiel kusenon.

Mia aŭstra-germana akĉento iel donis al mi memfidon por eskapi. La sekvan matenon mi forlasis la vagonon, ĉirkaŭrigardis kaj rimarkis foran bieniston prilaboranta sian teron. Mi alproksimiĝis lin kaj komencis kutiman konversacion por havi iom da loka informo. Mi lernis, ke rapida trajno trapasos la lokon proksimume je noktomezo. Ŝajnis al mi la ĝusta trajno por trafi. Mi interŝanĝis cigaredojn, kiujn mi havis de porciumo en Vieno, kontraŭ aŭstra mono, kaj promenis al la stacidomo, kie oni informis min, ke nur unuaklasa bileto haveblas. Mi aĉetis ĝin. La trajno alvenis, haltis dum minutoj kaj ekveturis al Salzburg. Mi trafis ĝin. Ĝi estis plena de homoj. Mi devis stari en la koridoro sed ne gravis. Mi sentis min feliĉa kaj malstreĉita, ĉar mi estis survoje al mia celo. Neniu biletkontrolisto alvenis, kaj mi sentis min sekura kaj kiel ĉiam optimisma.

Finfine la trajno atingis Salzburgon. Post ĉirkaŭpromeno parolante al homoj, mi lernis, ke oficejoj de la Franca Okupacia Armeo kaj la Usona Okupacia Armeo ekzistis tie. Plene je memfido, mi iris al la franca oficejo por organizi mian vojaĝon al Parizo. Ili informis min, ke ili ne povas helpi min, ĉar mi ne estas franco. Kiam mi iris al la Usona Okupacia Armea Oficejo, ili respondis simile, ke mi ne estas usonano.

Salzburgo estis urbo de miaj revoj. Mi ĝuis kelkajn tagojn tie kaj ĝuis aŭskultadon de klasika muziko. Klopodi trovi vojon el la urbo estis mia plej grava problemo. Mi dormis sur benko ĉe la stacidomo. Simpatia purigistino permesis al mi min lavi dum ŝi staris ekster la necesejo gardante la pordon por ke neniu ĝenu min.

Estis supoprovizejoj por homoj kiel mi. Ni devis viciĝi por ricevi la supon, panon kaj iom da fromaĝo. Mi viciĝis trifoje tage, sentante ĉiam malsata. Postnelonge mi lernis kiel almozpeti por manĝaĵo. Pro mia perfekta germana, mi povis ricevi iom da manĝaĵo kiel aŭstro ĉe la urbodomo kaj refoje kaj refoje ĉe aliaj bonfaraj kuirejoj. Kiam mi lernis, ke manĝaĵo disdoniĝas ie, mi tuj kuris tien

Daŭras **>

kaj enviciĝis. Mi eĉ ricevis kuponojn por cigaredoj, ĉar oni misidentigis min kiel aŭstron, kaj mi interŝanĝis la kuponojn por manĝaĵo, iufoje ricevante panon aŭ fromaĝon aŭ eĉ sekigitajn vinberojn.

Mi ne ankoraŭ havis iujn ajn dokumentojn aŭ identigilon. Tamen, mia frato sendis al mi leteron de Parizo al Budapeŝto, skribite de hospitalo en Parizo, kiu klarigis, ke mi havas kompetetecon por uzi kirurgian ekipaĵon. Mi alte taksis ĉi tiun leteron, kredante, ke ĝi estus mia nura rimedo eskapi. La letero petis al ĉia instanco, permesu min iri al Parizo senhezite. Ĝi estis skribita en la franca kun oficiala angla traduko, havis sigelon kaj estis ĝuste subskribita. Ĝi donis al mi esperon.

Estante nesukcesa ĉe la franca kaj usona instancoj, mi iris al la aŭstra aŭtoritato por helpo, sed ili informis min, ke ili ne povas, ĉar mi ne estas aŭstro.

Poeziangulo

kun KIT KELEN (MARKWELL, NSK)

JANE FRANK (BRISBANO)

Paul Klee: Vivtrejnisto *

Mi almetas hieroglifajn birdojn al mia plej ŝatata arbo
kiel vi diris. Miaj celoj estas pli klaraj. La folioj
brilas kiel vizio nun. Kiel koralo. Mi metas
sagojn por memorigi min pri la infano profunde ena.
La birdoj elflugis la kaĝon ĉi-matene kiam la
suno leviĝis kaj mi sekvis. La tutan tagon, ili
ridis: pro palmoj, pro fenestroj kaj nun pro la mallumo.
Kiel mi povas fari ĉi tiujn jarojn signifoplenaj?
    La plej bona
maniero estas aldoni stelojn kaj papiliajn flugilojn,
    velojn kaj
spajrojn. Tion oni faras. Ne identigu obstaklojn:
evitu ilin. Bona konsilo. Birdoj ne devas esti
kuraĝaj por flugi. Rigardu ilin. La aero kaptas ilian
imagpovon. Ili ignoras tendencojn kaj insultojn, migras
al belaj lokoj, kie la arboj estas rozkoloraj.
Havu novan aron da birdoj por ĉiu tago, vi diras.
Daŭre ridetu. Neniam ĉesu pentri la birdojn.

* Post *Vogelkomödie* (Birdkomedio)

Paul Klee: Life Coach *

I am pasting hieroglyph birds to my favourite tree
like you said. My goals are clearer. The leaves are
glowing like a vision now. Like coral. I am placing
arrows to remind me of the child buried deep. The
birds flew out of the cage this morning when the
sun came up and I followed. All day, they have been
laughing: at palms, at windows and now at the dark.
How can I make these years meaningful? The best
way is to add stars and butterfly wings, sails and
steeples. That's what you do. Don't identify
    obstacles:
avoid them. Good advice. Birds don't have to be
brave to fly. Watch them. The air catches their
imagination. They ignore trends and insults, migrate
to beautiful places where the trees are rose
    coloured.
Have a new set of birds for every day, you say.
Keep smiling. Don't ever stop painting the birds.

* After *Vogelkomödie* (Bird Comedy)

Jane Frank estas Brisbana poeto, redaktisto kaj akademiulo. Ŝia debuta poeziokolekto, *Ghosts Struggle to Swim*, estis publikigita fare de Calanthe Press en majo 2023, kaj ŝi estas la verkinto de du antaŭaj literaraj libretoj. Ŝia laboro estis vaste publikigita en ĵurnaloj kaj antologioj en kaj Aŭstralio kaj internacie. Ŝi instruas krean kaj profesian verkadon en Griffith University kaj estas redaktisto por recenzoj ĉe literatura ĵurnalo *StylusLit*.

Biologio en numeraloj

KATJA STEELE (ADELAJDO)

Oni ofte aŭdas diraĵon: "Vi ŝanĝiĝis." "Jes, mi maljuniĝis, mi griziĝis, mi dikiĝis" – iel tiel ni respondas kutime. "O jes, mi aŭdis, ke nia korpo renoviĝas ĉiun sepan jaron," diras kelkaj.

Do, ni ĝustigu la informojn laŭ la scienco, pli precize laŭ la libro de Adam Spencer: *World of Numbers* (La Mondo de Nombroj) – kaj kelkaj diversaj retpaĝoj.

La plejmulto da la neŭronoj en via cerbo (la nervaj ĉeloj, kiuj sendas mesaĝojn al via tuta korpo por ebligi al vi fari ĉion de spirado ĝis parolado, manĝado, marŝado kaj pensado) vivas dum la tuta vivo de la homo. Ni havas proksimume 100 miliardojn da cerbaj ĉeloj – kaj ni havas ilin de la naskiĝo. Dum la vivo ni perdas iujn, sed du tipoj de ĝi ja regeneriĝas: flar-ĉeloj kaj hipokampo (respondeca pri lernado).

Niaj okuloj aĝas tiom, kiom da jaroj ni havas. Tamen la korneo, la plej supra travidebla parto de la okuloj, regeneriĝas. Se ĝi damaĝiĝas, ĝi kapablas renoviĝi ene de 24 horoj.

Dek- ĝis dek-kvar-tage renoviĝas la gusto-ĉeloj en via buŝo. Temas pri proksimume 9 000 ĉeloj.

Probable vi ne sciis, ke la hepato povas ripari kaj rekreskigi sin. Ĝiaj ĉeloj vivas proksimume 150 tagojn. La hepato rekreskas, eĉ se oni forigus 75–90 % da ĝi!

Kredu aŭ ne, ankaŭ la homa koro renoviĝas. Tio estas sufiĉe nova malkovro. Dum la vivo la ankoraŭ nespecialiĝintaj ĉeloj de la koro (angle *stem cells* = praĉeloj) renovigas sin tri- aŭ kvarfoje.

Pli ŝanĝiĝemaj estas la pulmoj. Sed en ili estas diversaj ĉeloj kaj ili renoviĝas en diversaj rapidecoj. Iuj estas renovigitaj ĉiun duan aŭ trian semajnon, aliaj en ĉirkaŭ unu jaro.

La internaj muroj de la digestaj organoj devas alfronti diversajn fortajn kemiaĵojn, kiel acidojn, do ili renovigas sin ĉiun duan aŭ trian tagon, kelkaj la kvinan tagon.

La korpo kontaktas la eksterajn elementojn unue per sia haŭto. La poluado, suno, vento, pluvo – ĉio ĉi estas damaĝa, do la haŭto renovigas sin en du ĝis kvar semajnoj. Bedaŭrinde, dum ni aĝiĝas, la ĉeloj perdas substancon nomatan kolageno, do nia "nova" haŭto ne iĝas pli juna.

Ankaŭ la ostoj konstante renovigas sin. Daŭras proksimume dek jarojn, ĝis la kompleta skeleto renoviĝas, sed de la mezaĝo la procezo malrapidiĝas – kaj la ostoj iĝas frakasiĝemaj kaj maldensaj.

Ĉu vi konscias, kiom ofte vi devas tondi viajn fingro-ungojn? Ili kreskas ĉirkaŭ 3,5 milimetrojn monate, do daŭras pli-malpli ses monatojn, ke ili komplete rekresku. La ungoj sur la piedfingroj bezonas dek monatojn por tio.

La ruĝaj sangoĉeloj portas oksigenon kaj forportas la toksojn el la korpo. Ili renoviĝas en proksimume kvar monatoj.

Ni havas diversajn tipojn de blankaj sangoĉeloj. Ili vivas averaĝe unu ĝis tri tagojn, sed certaj tipoj dum jaroj.

Kian konkludon mi faris laŭ tiuj ĉi informoj?

La plejparto de nia korpo estas pli juna ol ni estas!

Vizito al stranga lando

DAVID RYAN (WELLINGTON)

En decembro de 2025 mi pasigis kelkajn tagojn en Moldavio. Moldavio estas malgranda kaj nebone konata lando en orienta Eŭropo inter Rumanio kaj Ukrainio, kun loĝantaro de iom pli ol 4 milionoj. Ĝia grandeco estas 33 000 kvadrataj kilometroj. Kompare, Canterbury (Nov-Zelando) havas 44 000 kaj Tajvano, 35 000 kvadratajn kilometrojn.

Moldavio estis parto de Rumanio antaŭ la dua mondmilito, sed ekde 1945 parto de la Sovetunio kaj nun sendependa lando. La oficiala lingvo estas la rumana. Fakte, la nacia himno estas "*Limba noastră*" ("nia lingvo").

Moldavio famas pro la fakto ke ĝi estas la plej malriĉa lando en Eŭropo. Vizitas malmultaj turistoj, kaj agrikulturo estas la plej grava sektoro. Moldavio famas pro sia vino. Granda parto de la enloĝantoj ankoraŭ loĝas en la kamparo, kaj multaj homoj jam forlasis la landon por gajni pli da mono alie.

Mi restis en la ĉefurbo, Kiŝinevo (*Chişinău* en la loka lingvo), kaj surprizis min la ankoraŭa rusa influo. Multaj moldavoj ankoraŭ parolas la rusan kaj mi vidis multajn ruslingvajn surstratajn afiŝojn kaj bretojn plenajn je rusaj libroj en librovendejoj. Ne estas tiom da okcidentaj influoj. Ekzemple, oni trovas McDonald's, sed preskaŭ neniun alian internacian markon. Tamen, la plej videbla soveta postlasaĵo estas la ege aĉaj apartamentaj konstruaĵoj konstruitaj dum la komunista epoko. Oni diris al mi, ke multaj homoj plendas ĉar ukrainoj nun emas aĉeti tiujn malbelegajn apartamentojn kaj prezoj plialtiĝas. Tamen, la ĉefurbo ankaŭ estas bela, kun multaj rusortodoksaj preĝejoj kaj belaj oficialaj konstruaĵoj.



Aĉaj sovetstilaj apartamentoj

En la orienta parto de Moldavio, apud la landlimo kun Ukrainio estas Transnistrio, oficiale parto de



Bela rusortodoksa preĝejo



Nacia muzeo kun statuo de Romulo kaj Remo kun lupino kiu mamnutras ilin, simbolo de la romia deveno de Moldavio kaj Rumanio

Moldavio, sed teritorio kiu deklaris sian sendependecon en 1990 kaj nun estas neagnostita ŝtato. Ĝiaj 500 000 enloĝantoj parolas la rusan, ĝi havas propran valuton, kaj rusaj soldatoj troviĝas tie. Turistoj povas viziti la teritorion en tagekskurso sed oni kontrolas pasportojn ĉe la "landlimo" kun Moldavio. Mi ne vizitis Transnistrion ĉar mia vojaĝasekura kompanio ne permesis tion.

Mi rekomendas viziton al Moldavio ĉar temas pri lando, kiu certe malrapide plimoderniĝas, sed ankoraŭ havas iom da aspekto de eksa komunista lando. E

Langotordiloj

KATJA STEELE (ADELAJDO)

Ĉu vere viro vidis vin veni?
Ŝi serĉas ŝercojn saĝajn por interŝanĝoj.
Ne plu ploru plorulino pro propra plezuro.
Al apartamento parte apartenas aparta portaparato.
Tri tre tristaj turistoj trafis l' trotuaran truon.
Ĉiuj ĉasistoj ĉiam kaj ĉie senĉese ĉasu la ĉamon.
Ne tremas entrepreno pro pertrama tertremo. E

Intervjuo kun Moisés Herrera Barrera

DAVID RYAN (WELLINGTON)

Dum la somerkursaro en Aŭklando en januaro de 2026, Moisés Herrera Barrera el Kolombio instruis al proksimume 15 partoprenantoj en la altnivela kurso. Jen kelkaj interesaj detaloj pri Moisés.

Moisés, 29jara, naskiĝis en Kolombio kaj loĝas en Chia, urbo norde de la ĉefurbo, Bogotá. Li laboras sendepende kiel programisto kaj, krom lerni lingvojn kaj aŭskulti muzikon, lia granda intereso estas programado.

Moisés komencis lerni Esperanton interrete en 2019 (Moisés rekomendas la retejon **lernu.net**). Li estas nun grava membro de la movado en Kolombio kaj kunorganizis virtualan kurson de Esperanto por hispanparolantoj. La movado kreskas rapide en Kolombio kaj ĉiujare estas pli ol 500 aliĝintoj de la kurso, fakte ne nur de Kolombio sed ankaŭ de aliaj hispanlingvaj landoj kaj eĉ de portugallingvaj landoj pro la sufiĉa interkomprenebleco kun la hispana.

Moisés interesiĝas pri konstruitaj lingvoj kaj, krom Esperanton, li jam studis kelkajn aliajn, ekzemple la klingonan lingvon, Lojban, kaj Ithkuil. Li parolas ankaŭ la anglan, iom studis la germanan, kaj ekstudis la ĉinan kaj japanan. Kvankam li pasigis nelongan tempon en Nov-Zelando, li diris ke li trovas kurioze aŭskulti tiom da lingvoj kiujn oni parolas ĉi tie, ekzemple la ĉinan kaj baratajn lingvojn. Moisés diras ke Nov-Zelando estas tre bela lando kaj li ŝatis la lokojn, kiujn li vizitis en Aŭklando.



Moisés jam ĉeestis virtualajn kursojn kaj kongresojn de Esperanto sed la somera kurso en Aŭklando estis lia unua ĉeesta evento, kaj ni dankas lin pro lia kontribuo ne nur kiel instruisto sed ankaŭ pro tre interesa ĝenerala prelego pri Kolombio.

Sagrada Família

HAYDEN HENDRICKS (BARCELONO)

Delonge estante unu el la plej famaj preĝejoj en la mondo, des pli fama por esti ankoraŭ konstruata, la Sagrada Família jam estas tiom vaste konata, tiom amase vizitata, tiom ofte fotata, ke ĝi ŝajnas bezoni neniun enkondukon. Tamen…

La Pentofera Templo de la Sankta Familio (katalune *Temple Expiatori de la Sagrada Família*, aŭ simple konata kiel la *Sagrada Família*) estas katolika preĝejo en Barcelono, Katalunio. La 7an de novembro 2010, Papo Benedikto la 16a konsekris la preĝejon kaj proklamis ĝin malgranda baziliko. La 30an de oktobro de 2025, ĝi superis la altecon de la ĉefpreĝejo de Ulm (germane *Ulmer Münster*), fariĝante la plej alta kristana preĝejo en la mondo. En 2026 ĝi atingos sian finan altecon de 172,5 metroj. Tiu preciza alteco, same kiel ĉiuj detaloj de la templo, estas plena je signifo. Arkitekto Antoni Gaudí volis, ke la templo estu malpli alta ol la proksima monto Montjuïc, ĉar li kredis, ke neniu homa kreaĵo estu pli granda ol verko de Dio.

Influite de novgotika arto kaj orientaj teknikoj, Gaudí fariĝis membro de la modernisma movado de la malfrua 19a kaj frua 20a jarcentoj. Tamen, liaj malfruaj verkoj transcendis la ĉefajn trajtojn de modernismo, evoluante en unikan stilon inspiritan de naturaj formoj. Tiujn konceptojn li skizis per novigemaj tridimensiaj skalmodeloj, ekz-e pendantaj ĉenaj modeloj. Per eksperimentado kun tiaj modeloj, li malkovris manieron uzi tradiciajn katalunajn masonteknikojn laŭ novaj, pli kompleksaj manieroj. Ĉeno pendigita de ambaŭ finoj rezultigas

Daŭras **>



perfektan kurbon, kiu nature distribuas la senmovan ŝarĝon, ĉi-okaze strecon, egale inter la ĉeneroj. Kiam tiu formo estas vertikale renversita kaj la materialoj fariĝas briko aŭ ŝtono, tiam la senmova ŝarĝo fariĝas simile egale distribuita, rezultigante optimume efikan arkon. Kvankam tio jam estis konata dum jarcentoj, Gaudí aplikis la analogion inter strecon kaj kunpremo al ĉenoj malsimetrie pendantaj, kio permesis al li desegni multe pli fluidan arkitekturon.

La katolikismo de Gaudí intensiĝis dum lia vivo, kaj religiaj bildoj pli kaj pli manifestiĝis en liaj verkoj. En 1883, Gaudí estis dungita desegni la Sagrada Família, grandega preĝejo de la estonteco. La sekvajn tri jardekojn, Gaudí prilaboris la Sagrada Família kaj samtempe akceptis aliajn projektojn. En tiu periodo, finkonstruiĝis la kripto, situanta unu nivelon sub la absido de la baziliko, kaj inaŭguriĝas la Kapelo de Sankta Jozefo. Ekde 1914, Gaudí laboris ekskluzive pri la Sagrada Família, ĝis sia morto en 1926. La sonorilturo dedicita al la apostolo Barnabaso estis la sola, kiun Gaudí vidus finita en sia vivo. Post lia morto, la verkoj de Gaudí suferis periodon de neglekto. En 1936, dum la Hispana Enlanda Milito, multaj dokumentoj, planoj, kaj skalmodeloj estis detruitaj.

En la 1950aj jaroj, samlandano Salvador Dalí laŭdis la verkaron de Gaudí, kaj la opinio de la publiko ŝanĝiĝis. En 1952, la fasado de la Naskiĝo estas lumigita unuafoje. En 1954, metiĝis la fundamenta ŝtono ĉe la fasado de la Pasio. Dum la sekvaj jaroj, venis multaj mejloŝtonoj kaj kontribuis pluraj generacioj da artistoj. Elstaras Josep Maria Subirachs, kataluna skulptisto, kiu desegnis la skulptaĵojn de la fasado de la Pasio. Subirachs rimarkinde kreis esperantaĵojn ĉe la pordo de la Sagrada Familia. En la fasado de la Gloro, la ĉefa enirejo, troviĝas la pordo de la Eŭkaristio, kie aperas la preĝo "Patro Nia" en 50 lingvoj, inter ili Esperanto.

Dum **IJK 2026** en Tiana, kataluniaj kongresanoj havos oportunon viziti Sagrada Família kun Esperanta ĉiĉerono. Okazos dum la kongreso ankaŭ plena suneklipso, la unua en Eŭropo ekde 1999. Pro la natura fenomeno de la suneklipso kaj la graveco de naturo en la verkoj de Gaudí, la temo de la kongreso estos "Naturo el la Homaj Okuloj". Tiu moto celas inspiri dialogon pri daŭripovo kaj interkultura kunlaboro. Dum unu semajno en la montoj de Tiana, centoj da junuloj el la tuta mondo uzos komunan lingvon por priskribi komunan vojon antaŭen.

Nun estas via tempo por tuj aliĝi al la IJK 2026. Vizitu la retejon de la kongreso, **ijk2026.tejo.org**, por legi ĉiujn informojn kaj aliĝi per la aliĝilo.



La transirejo kaj kupolo de Sagrada Família

Manĝarbaro: solvo al multaj problemoj

JOANNE CHO (CENTRA MARBORDO, NSK)

Unu el miaj plej grandaj pasioj estas kreskigi novajn plantojn — precipe manĝeblajn — en nia ĝardeno. Tio ne temas nur pri manĝaĵproduktado, sed pri krei pli intiman kaj konscian rilaton kun la vivo ĉirkaŭ ni. Eble plantoj ne pensas kiel ni, tamen por mi manĝi sen malŝparo estas profunda formo de respekto al ili.

Por esprimi tiun dankemon, mi konstante eksperimentas: kun sterkmetodoj, kun kuirmanieroj, kun diversaj manĝeblaj partoj de plantoj, kaj eĉ kun la maniero prezenti la manĝaĵon sur teleroj. Tiu procezo neniam lacigas min — la eblecoj estas senlimaj. Eble ĝuste pro tiuj eksperimentoj miaj bananoj akiras surprizan gamon da gustoj. En unu sola banano oni povas percepti acidon, dolĉecon, salecon kaj eĉ spicon samtempe. Kial tiel? Unu ebla klarigo estas mia kompoŝtado: mi uzas ĝin kiel gravan sterkmetodon, kaj ofte aldonas al la kompoŝto kimĉian sukon, kune kun aliaj nutraj manĝaĵrestaĵoj.

Tiu sperto kondukis min al temo, kiun mi prezentis dum la kongreso en Aŭklando en 2026: **La manĝarbaro**.

La ĉefa ideo de manĝarbaro estas simpla, sed potenca: imiti naturan arbaron, tamen per plantoj kiuj nutras homojn. Anstataŭ tradicia, unu-tavola legomĝardeno, la manĝarbaro estas plurtavola, diversspeca, longdaŭra kaj memsubtena. Ĝi funkcias kiel vivanta ekosistemo, en kiu la grundo mem estas viva — nutrante mikrobojn, fungojn kaj vermojn, kiuj siavice subtenas la tutan sistemon.

En ĉi tiu artikolo mi fokusos pri tri ĉefaj aferoj:

- la tavoloj kaj strukturo de manĝarbaro,
- kiel komenci manĝarbaron en praktika maniero, kaj
- kiel apliki la principojn de manĝarbaro eĉ en malgranda ĝardeno.

La tavoloj kaj strukturo de manĝarbaro

Manĝarbaro ne estas hazarda plantaĵo de arboj kaj legomoj. Ĝi estas zorge desegnita sistemo, kiu imitas la strukturon de natura arbaro. Ĉiu tavolo havas propran rolon, kaj kune ili kreas stabilan, produktivan kaj memsubtenan ekosistemon.

Daŭras **>





1. La supra arbara tavolo
– la tegmento de la sistemo

Tiu tavolo konsistas el altaj arboj, kutime inter ses kaj dek metroj, kiuj donas ombron, protekton kontraŭ vento kaj longdaŭran strukturon al la tuta manĝarbaro.

Tipaj ekzemploj estas nuksarboj, kiel pekano kaj makadamio, same kiel altaj fruktarboj, ekzemple mangoarbo aŭ morusarbo.

2. La sub-arbara tavolo
– la ĉefa frukto-donanto

Sub la altaj arboj troviĝas pli malaltaj arboj, ĉirkaŭ tri ĝis kvin metrojn altaj. Ĉi tiu tavolo ofte estas la ĉefa fonto de fruktoj por la homo.

Tie prosperas citrusoj kiel oranĝoj, citronoj kaj mandarinoj, sed ankaŭ pomoj, persikoj, gujavoj, fejĵooj (*Feijoa sellowiana*), liĉio kaj kakao.

3. La arbusta tavolo
– beroj kaj utilaj akompanantoj

La arbusta tavolo, proksimume unu ĝis unu kaj duonan metrojn alta, riĉigas la manĝarbaron per beroj kaj aromaj aŭ utilaj plantoj.

Inter la plej oftaj estas mirteloj, framboj kaj riboj. Aldone, rosmareno servas kiel sekotolera herbo kaj natura insektoforpelilo, dum hibisko aldonas kaj manĝeblan kaj ornaman valoron.

4. La herba tavolo
– ĉiutaga manĝo kaj kuracado

Ĉi tie troviĝas manĝaj kaj kuracaj plantoj, kiuj ofte estas plej proksimaj al nia ĉiutaga kuirado.

Ekzemple: bazilio dum somero, koriandro aŭ aneto dum vintro, ocimo (*Ocimum tenuiflorum*) kiel magneto por polenantoj, kalendulo pro sia manĝebla kaj resaniga naturo, mento, krispa brasiko kaj citronherbo, kiuj samtempe funkcias kiel bariloj kaj fontoj de mulĉo.

En malsekaj lokoj bone kreskas taro, dum simfito estas tre valora "hak-kaj-faligu" planto, kiu eltiras nutraĵojn el profunda grundo kaj alportas ilin al la surfaco por najbaraj plantoj.

5. La grundkovra tavolo
– vivanta protekto

Grundkovraj plantoj protektas la grundon kontraŭ sekiĝo, erozio kaj troa varmigo.

Bonaj elektoj estas frago, batato, trifolio kaj pinta arakido, kiuj krome fiksas nitrogenon en la grundo.

6. La radika tavolo – la subtera rikolto

Sub la surfaco troviĝas la radika tavolo, ofte forgesata sed tre grava.

Tie kreskas manĝeblaj radikoj kiel zingibro, kurkumo, ajlo, cepo, manioko en pli varmaj regionoj, kaj dajkono (japana rafano), kiu helpas rompi densan grundon kaj plibonigi ĝian strukturon.

7. La grimpantaj plantoj – vertikala inteligenteco

Grimpantoj utiligas vertikalan spacon sen bezono de aparta terpeco.

Vinberoj, pasifloro, fazeoloj kaj ignamo estas bonaj ekzemploj — kvankam pri ignamo necesas atento, ĉar ĝi havas tre fortan kreskon.

Pliaj tavoloj

En pli kompleta manĝarbaro oni povas aldoni pliajn tavolojn, kiel la **fungan tavolon**, kiu transformas organikan materialon en nutraĵojn, kaj la **lagetan tavolon**, kiu aldonas akvon, biodiversecon kaj mikroklimatan stabilecon.

Kiel komenci manĝarbaron? Simpligita plano

Komenci manĝarbaron ne postulas perfektan planon nek grandan buĝeton. Pli gravas ritmo, observado kaj pacienco. Jen simpla, iompostioma aliro:

Monato 1

Plantu unu arbon kaj mulĉu profunde — ĉirkaŭ 10 ĝis 15 centimetrojn. Tio estas la fundamento de la tuta sistemo.

Monatoj 2–3

Aldonu arbustojn kaj grundkovrajn plantojn. La strukturo ekformiĝas, kaj la grundo komencas reviviĝi.

Monato 4 kaj poste

Enkonduku herbojn, radikplantojn kaj grimpoplantojn. La sistemo nun kapablas subteni pli da diverseco.

Grava principo estas ne planti ĉion samtempe. Donu al la manĝarbaro tempon "lerni" — kiel vera viva sistemo.

Daŭras **>



Kiel apliki manĝarbaron en malgranda ĝardeno?

Manĝarbaro ne bezonas vastan teron. Eĉ en tre malgranda spaco — korto, antaŭĝardeno, aŭ eĉ balkoneto — la koncepto funkcias.

1. Pensu vertikale, ne horizontale

Anstataŭ demandi "kio eniras en ĉi tiun spacon?", demandu: **Kiom da tavoloj mi povas uzi ĉi tie?**

Ekzemple, por unu malgranda arbo:

- **Arbo:** nana citronarbo, fejĵoarbo aŭ prunarbo
- **Sube:** rosmareno, citronherbo, simfito
- **Grundkovro:** fragujoj, nasturtioj
- **Radikoj:** ajlo, cepoj
- **Grimpanto:** pasifloro laŭ barilo

Unu spaco — ses funkcioj.

2. Elektu plantojn kun pluraj roloj

En manĝarbaro ĉiu planto devus kontribui pli ol unu manieron: manĝebla, polenant-alloga, grundnutra, herbosubpremanta, aŭ ĉiuj samtempe.

Bonaj ekzemploj estas:

- **Simfito:** sterko kaj mulĉo
- **Nasturtio:** manĝebla kaj insekt-loga
- **Lupeno aŭ pizo:** nitrogen-fiksanto
- **Batato:** grundkovro kaj rikolto

3. Ne celu perfektecon

Manĝarbaro estas procezo, ne projekto.

Komencu simple: unu arbo kaj tri ĝis kvin subplantoj kun bona mulĉo.

Poste observu, aldonu kaj adaptiĝu.

Arbaro neniam estas "finita".

4. Potoj ankaŭ funkcias

Eĉ sur balkono eblas krei manĝarbaran logikon: granda poto kiel "arbo", mezaj potoj kiel arbustoj, kaj malgrandaj potoj por herboj kaj grundkovraĵoj.

La rilatoj inter plantoj ofte gravas pli ol la tero mem.

Fina demando

Do, ĉu vi nun pretas krei vian propran manĝarbaron?

Kuriozaj mapoj

HELEN PALMER (ADELAJDO)

Dum la bona 2026 januara somerkursaro mi prezentis sesion pri interesaj mapoj. Fakte, laŭ mi, ĉiu mapo estas interesa – ili vere estas plenaj da informo – kaj mi povas malstreĉiĝi rigardante mapojn kiel gazeton aŭ libron. Rigardi mapojn sur mia poŝtelefono estas malfacile por mi. Mankas la kunteksto: la spaco, la montoj, la proksimaj lokoj, ktp. Nuntempe multaj homoj uzas nur mapojn sur siaj poŝtelefonoj kaj ne konscias pri spaco, kaj sen telefono ili estas facile perditaj.

Mi komencis la sesion per la desegnado de mapoj kaj tio vere estas ridega afero. La desegnado de mapo laŭ memoro estas malfacila. Aŭstralianoj klopodis desegni mapon de Nov-Zelando kaj inverse – ĉiuj ridis. Kaj tiam, post la antaŭa vespero, kiam ni lernis de Moisés (intsruisto de Kolombio) pri Kolombio – ni klopodis desegni tiun landon, ni ĉiuj memoris ion malsimilan: la andajn montojn, la ebenaĵon en la oriento, la ligon kun Panamo, la Pacifikan Oceanon kaj la Kariban maron – amuze!

Post tio, mi montris mondmapojn, kie partoj de la mondo estas kolorigitaj. Tiuj mapoj estis sen klarigo pri la koloroj. Ĉeestantoj devis diveni la signifon de la mapoj. Ĉu ĝi estas mapo montranta tipojn de homoj? de aĝoj? de okazaĵoj en la pasinteco? Ni interparolis pri la mapoj, debatis, kaj mi donis pecojn da informoj – nur aludoj. Sur unu mondmapo multaj landoj estis kolorigitaj, sed ne ĉiu lando, ne la sekvaj landoj: Nov-Zelando, Antarkto, sed jes la Arkto. Kial? Post diskuto mi malkaŝis la respondon – tiu mapo estis pri la lokoj kie vi povas trovi serpentojn. Jes, ne estas serpentoj en Nov-Zelando!

Ĉi tie ni povas vidi unu el la mapoj, kiujn mi montris. (Bildo 1)



Bildo 1

Bela mapo, ĉu ne?

Kion ĝi montras?

Duonon de la mondo. Jes.

Multe da blueco. Jes.

Certe, estas alia perspektivo ol la kutima.

Certe, ni povas vidi Aŭstralion kaj Nov-Zelandon. (Bone por niaj kongresanoj.)

Kio estas la titolo de tiu mapo? "La hemisfero de akvo".

Ni loĝas en la hemisfero de akvo, 89

Daŭras **>



Bildo 2

procento de tiu flanko de la mondo estas akvo.

Kelkaj el la aliaj mapoj, kiujn mi montris estis mondmapo kie estas la landoj Nov-Zelando, Papuo-Nov-Gvineo, Japanio, Ĉilio, Peruo, landoj de Centra Ameriko kaj la okcidenta parto de Usono. Sur la mapoj tiuj landoj estis plenaj de koloro, kaj la ceteraj landoj havis neniun koloron. Tiu mapo montris la intensecon de tertremoj. Novzelandanoj parolis iomete pri siaj spertoj kun tertremoj – preskaŭ ĉiuj el ili spertis pli ol unu! Ankaŭ Moisés de Kolombio spertis (se mi bone memoris).

Alia interesa, babiliga aro da mapoj estis pri bataladoj aŭ bataloj en la mondo.

La unua estis pri bataloj en Eŭropo:

Tiu mapo (de la Fejsbuka loko "Simon ŝatas mapojn") instigis multajn diskutojn. Mi ŝatas, kiel prezentanto, kiam ĉeestantoj diskutas, debatas, kontraŭas vigle. Ne estas nur mi, kiu informas/pensas. Ĉiuj havas opiniojn. Tiu mapo eble devenis de la venkintoj en tiuj bataloj? Ĉu vere estas nur unu aŭ du bataloj en Nov-Zelando kaj Aûstralio? Ĉu ĝi estas tro eŭropcentra mapo? El kie venas la informo por tiu mapo? Estas multe por diskuti pri ĝi.

Post la montrado de tiu mapo ni montris mapon pri la tiel nomitaj "masakraj" lokoj en Aûstralio. Estis centoj da lokoj, kiujn ni nun konas, kie okazis masakroj de la indiĝenaj homoj fare de la novaj blankulaj enmigrantoj. Tiuj faktoj ne estis instruitaj en mia lernejo dum la 1960aj jaroj. Iomete post iomete ni nun scias. Pli por diskuti.

Tiam ni vidis mapon de ĉiuj/multaj da maoriaj disdividoj de Nov-Zelando. Kelkaj novzelandanoj iomete klarigis la historion.

Mapoj certe ne estas la tuta vero. Ili montras historion, manierojn por vidi la mondon aŭ landon tra la okuloj de specifa kulturo/genro/raso, ktp. Ĉiam estas interese kaj mirinde por mi, kaj mi ŝatas dividi tiun intereson kun aliaj.



Protokolo de la jarkunveno de AEA

Lundon, la 12an de januaro 2026, je la 5a ptm

Ĉe St Francis Retreat Centre, Hillsborough, Auklando, Nov-Zelando

Ĉeestantoj

Fizike: Helen Palmer, William Georgeson, Sandor Horvath, Kam Lee, Bradley McDonald, Heather Heldzingen,, Brendan Price, Sophie Kitney, Charles Stevenson, Jennifer James, Craige McWhirter, David Ryan, Franciska Toubale

Per Zoom: Katja Steele, Terry Manley, Jonathan Cooper, Joanne Johns, Nicole Else, Trevor Steele, Carol Symons, Stephen Pitney, Suzanne Palmer-Holton, Peter Danzer

Pardonpetoj

Esther Parris, Peter Johns

Forpasintoj

Minuto da silento estis okazigita por memori la esperantistojn, kiuj mortis dum la pasinta jaro: Max Wearing, Libby Mortimer kaj Svetislav Kanacki.

Protokolo de la antaŭa jarkunveno

Aprobita.

Raportoj de la komitato

Sandor (prezidanto) prezentis sian raporton, kiu inkluzivis:

- La ĉiumonataj Zoom-prelegoj daŭris la trian dimanĉon de ĉiu monato je la 5a posttagmeze (sidnejtempe) kaj kutime altiras 25–35 homojn, plejparte el aliaj landoj. Ni bezonas pli da aŭstraliaj parolantoj kaj partoprenantoj.
- Prepari la kongreson kaj somerkursaron ankaŭ estas granda tasko. Dankon al Jonathan pro la retejaj ĝisdatigoj, al Joanne pro la dezajna laboro, al Heather pro la daŭra laboro kiel kasisto, kaj al la volontuloj de 3ZZZ.
- Jonathan Cooper estis gasto ĉe la radio ABC, Late Night Live.
- Dankon al Joanne pro ĉiu ŝia prepara laboro por la akcepto de Melburno por la Universala Kongreso de 2027.

Jonathan (vicprezidanto) prezentis sian raporton, kiu inkluzivis:

- Ĝisdatigadon de la retejo de AEA.
- Lian intervjuon ĉe Late Night Live.
- Lian intervjuon ĉe la loka radioprogramo de ABC kun Mark Humphries.
- Iuj provis rompi nian retejon sed ne sukcesis.

Joanne (sekretario) prezentis sian raporton:

- Melburno estis elektita kiel la loko por la Universala Kongreso de 2027.
- Melburna Esperanto-Asocio nun havas sian propran ejon en Little Collins Street, Melburno.
- Sabataj Esperanto-kursoj komenciĝis; Rejnoldo Evans estas la instruisto.

Terry (komitatano kaj ESK-redaktisto) prezentis sian raporton:

Terry petis, ke membroj sendu artikolojn por ESK kaj dankis la kontribuantojn de la pasinta jaro (kaj Jonathan pro dezajna laboro). Li dankis Heather pro la sendado de la revuo, kaj Nicole Else, Trevor Steele kaj Donald Rogers pro helpo pri provlegado.

Helen Palmer dankis Sandor pro lia daŭra laboro en la organizado de la kongreso.

Ĉiuj raportoj estis akceptitaj.

Heather (kasisto) prezentis sian raporton:

- La kontoj estis preparitaj per MYOB.

- Donacoj ricevitaj de Kep kaj Dorothy Enderby de 50 000 dolaroj al AEA kaj EFNSW estis donacitaj al Melburno por ebligi aĉeti propran ejon en la urbocentro.
- Ni faris profiton entute, parte pro enspezoj jam ricevitaj por la Kongreso de 2026.

[Vidu sube.]

La raporto estis akceptita.

Katja Steele dankis la komitaton pro ĉiu ĝia laboro por la Esperanto-movado. Ŝi demandis ĉu eblas vendi niajn proprajn librojn ĉe la UK, kaj ke la libroj estu listigitaj en ESK.

William (komitatano) raportis, ke li petis, ke Moisés Herrara estu la instruisto por la nuna kongreso. Li informis, ke li daŭros kiel prezentanto por 3ZZZ.

Elekto de komitato

Ĉar neniuj aliaj nomumoj estis ricevitaj, voĉdono okazis por konservi la nunan komitaton.Tial:

Prezidanto – Sandor Horvath; Vicprezidanto – Jonathan Cooper; Sekretario – Joanne Johns, Kasisto – Heather Heldzingen; Komitatanoj – Terry Manley kaj William Georgeson

Unuanime aprobite.

Ĝeneralaj aferoj

Joanne Johns raportis, ke ni bezonas LKK-n kaj volontulojn antaŭ kaj dum la kongreso. Ni petas, ke la formularo, kiun ŝi sendis, estu plenigita kaj resendita al ŝi. La bezonataj postenoj estas prezidanto, sekretario, kasisto, arta aranĝanto, ekskursa aranĝanto, kaj organizantoj por la infana kongreso, retpaĝo, hoteloj, amaskomunikiloj, kongresa revuo, kaj homoj por prizorgi la budojn.

Craige McWhirter parolis pri la T-ĉemizoj, kiujn li dezajnis, kaj ankaŭ pri partopreno en la Folklora Festivalo, Woodford. Li organizos budojn por reklami Esperanton per libroj, informoj, T-ĉemizoj, laborsesioj kaj prelegoj.

Membrokotizoj

Membrokotizoj plialtiĝos:

- Plena membro $50
- Membro kun rabato $35
- Eksterlandano $50
- Dumviva membro $1 000

Oni decidis, ke la bankaj subskribantoj restu samaj.

La kunveno finiĝis je 6:15 ptm.

Financial report

HEATHER HELDZINGEN (TREASURER)

The accounts have been prepared using the MYOB computer accounting system.

Income on our *fondusoj* and term deposits are $6982.01. Our membership fees are slightly higher from 2024, owing to an increase to 85 members.

Congress income and expenses are skewed, owing to payments and receipts occurring in different years.

Our legacy from Kep and Dorothy Enderby in the sum of $50 000.00, as well as the legacy to the Esperanto Federation of New South Wales, has been donated to the Melbourne Esperanto Association to help with the purchase of their premises. This was accomplished in June 2025. The office is located in Little Collins Street, Melbourne.

Our assets are over $225 000, which assures our financial viability for some time to come.

Continues >

Balance sheet

Assets			
Current Assets			
Cash On Hand			
CBA Operating A/c 00903636	$17,334.10		
CBA Summerschool/congress 7294	$7,756.90		
Capital A/c 00946975	$7,253.87		
Petty Cash	$100.00		
Total Cash On Hand		$32,444.87	
Fondusoj			
CBA Term Deposit 50170900	$52,886.05		
CBA Term Deposit 94715	$48,082.77		
Int. Travel Fund 50143134	$75,972.64		
Total Fondusoj		$176,941.46	
PAYPAL		$946.35	
UEA Account Code AEAA-Z		$778.63	
Correspondence Course			
Total Current Assets			$211,111.31
Other Assets			
Accounts Receivable		$4,024.08	
Book Inventory			
Libroservo	$952.50		
AEA Library	$7,145.28		
Total Book Inventory		$8,097.78	
Total Other Assets			$12,121.86
Property & Equipment			
Equipment			
Equipment at Cost	$2,112.27		
Total Equipment		$2,112.27	
Total Property & Equipment			$2,112.27
Total Assets			$225,345.44
Liabilities			
Net Assets			$225,345.44
Equity			
Fondusdoj Funds			$145,762.17
Retained Earnings			$100,259.50
Life Membership Funds			$5,851.06
Current Year Earnings			-$27,677.53
Historical Balancing			$1,150.24
Total Equity			$225,345.44

Profit and loss

Income	
Membership Subscriptions	$2,170.00
Congress Income 2026	$21,245.00
Congress Income 2025	$3,721.50
Book sales	$487.00
ESK Reimburse. from NZ	$1,528.78
Donations	$225.00
Fonduso a/cs interest	$3,569.17
Miscellaneous Income	$195.00
Internat. Travel Fund Interest	$3,412.64
Total Income	$36,554.09
Cost of Sales	
Gross Profit	$36,554.09
Expenses	
Bank fees	$268.93
2026 Congress/Summerschool	$4,053.13
2025 Congress Expenses	$200.00
Donations	$53,600.00
Computer & internet expenses	$921.35
Legal Fees	$49.00
ESK Printing	$2,774.10
Postage	$1,670.24
Repairs and Maintennce	$237.00
Printing & Stationery	$457.87
Total Expenses	$64,231.62
Net Profit / (Loss)	-$27,677.53

El la regionoj

NOVA SUD-KIMRIO

Skulpturklasoj

En septembro 2025, ĉe art-ateliero malantaŭ Esperanto-Domo, komenciĝis klasoj por lerni kiel krei skulptaĵojn. La klasojn regas tre sperta skulptisto, Valerij Ĵelobinskij. Li naskiĝis en Sankt-Peterburgo, Rusio kaj lernis arton ĉe fama rusa art-akademio. Valerij migris al Aŭstralio antaŭ pli ol 30 jaroj kaj komencis en Sidnejo art-atelieron.

— Dimitry Lushnikov

Esperanto sur Loka Radio ABC

Sabaton, la 19an de januaro 2026, Mark Humphries intervjuis Jonathan Cooper pri Esperanto, ĉe ABC Local Radio. Kvankam ĝi estis en Sidnejo, oni povis aŭdi ĝin en multaj aliaj lokoj. Ĝi nun estas rete aŭskultebla: **eo.org.au/abclr2026**

— Jonathan Cooper

VIKTORIO

Pri la Gipslanda Esperanto-Klubo, Traralgon: Pasintjare en la komenco de la jaro, mi kaj alia loka Esperantisto Jim Radford komencis provi ŝanĝi niajn oftajn kunvenojn al loka klubo. Niaj renkontiĝoj okazas ĉiusabate de la 11a atm ĝis la 1a ptm, kie kutime ni du babilas pri la semajno kaj trovas ion por fari uzante la lingvon. Ĝis nun ne estis tiom da ekstera intereso, sed je la fino de la jaro virino aperis, kiu interesiĝis pri la lingvo, kaj mi komencis instrui la lingvon de la komenco al ŝi en ĉiu sesio antaŭ ol mi foriris por la kongreso en Nov-Zelando. Ŝi mendis lernlibron pri la temo kaj ŝajne venos multfoje en la estonteco.



Zamenhof-festo en Adelajdo



Mark Humphries, Loka Radio ABC

Espereble, ankaŭ en la estonteco, ni trovos pli da interesitaj homoj kiuj lernos – aŭ, fakte, jam konas – la lingvon. Antaŭ 50 jaroj en nia regiono de Gipslando, en la apuda urbeto Morwell, multaj junuloj lernis aŭ la lingvon aŭ almenaŭ pri ĝi, pro la penoj de ĉefinstruisto kaj esperantisto Ivan Maddern en la mezlernejo de Morwell.



Aŭklanda Esperanto-Societo

Ni esperas ke ni povos iam trovi iun de tiu epoko de la loka movado.

— William Georgeson

SUD-AŬSTRALIO

Dek tri esperantistoj venis al la komunumejo en Black Forest por celebri la naskiĝtagon de LL Zamenhof. Trevor Steele bonvenigis la ĉeestantojn kaj la unua anoncita informo estis, ke la UK de UEA en 2027 okazos en Melburno. Ĉiu spontanee aplaŭdis.

Ni havis festparoladon (Trevor Steele), mallongan trarigardon de la okazintaĵoj kaj plurajn prezentaĵojn kiel rakontetojn, ŝercojn, teatraĵeton, pup-fabelon. La dua horo kune estis pasigita per agrabla babilado ĉe kafo, teo, kaj kuketoj.

— Katja Steele

AŬKLANDO

La 15an de Februaro la Aŭklanda Esperanto-Societo renkontis du vizitantojn, Petra kaj Ralf, el Bochum en Germanio (tio estas urbo apud la landlimo kun Nederlando kaj proksime de Düsseldorf). Tiel ni ĝuis tre bonan unuan kunvenon de la jaro.

Petra donis al ni kartonajn subglasaĵojn tiajn, kiaj estas kutimaj en drinkejoj. Sur ili estis presitaj en la germana la dek ses reguloj de Esperanto. Tio povas esti bona propagandilo por ni – ni devos pripensi tion.

Estas ĉiam bone vidi eksterlandajn vizitantojn.

— David Rockell E

Por detaloj de grupoj kaj kunvenoj en Aŭstralio, vizitu **esperanto.org.au/lokaj-grupoj**.

Fotokonkurso-gajnintoj

La 16an de januaro, dum la kongresa bankedo en Aŭklando, anonciĝis la gajnintoj de la kongresa fotokonkurso. Jen elekto.





◀ *1a premio – Helen Palmer*

▲ *2a premio – Joanne Cho*

▶ *3a premio – Ana Alebić-Juretić*



Por vidi la ĉiujn premiitajn fotojn, vizitu
esperanto.org.au/fotokonkurso-2026

Agnoskoj pri fotoj

Kovrilo Helen Palmer
4 Peter Balaz
5, 6 Nekonataj, per Joanne Johns
7 David Ryan
9 Eldonejo *De Gruyter Mouton*
14, 15 David Ryan
16 David Ryan
17 Bernard Gagnon per Wikimedia Commons
18 "SBA73" per Wikimedia Commons
19–21 Joanne Cho
23 Wikimedia Commons
24 Sandor Horvath
28 Mark Humphries per ABC; Katja Steele
29 David Rockell
30 Helen Palmer; Joanne Cho; Ana Alebić-Juretić
32 Aŭstralia Esperanto-kongreso, Adelajdo 2025. Foto: Joseph Horst

Australian Esperanto Association

GPO Box 2122
Melbourne VIC 3001
Australia

esperanto.org.au
info@esperanto.org.au
0403 358 941

Sandor Horvath | **President**
Jonathan Cooper | **Vice-President**
Heather Heldzingen | **Treasurer**
Joanne Johns | **Secretary**

Committee Members:
William Georgeson, Terry Manley

AEA was established for the promotion, teaching, and use of the international language, Esperanto, in Australia.

AEA aims to make Esperanto available to help with intercultural understanding and harmony, and works to foster co-operation among Esperanto organisations with similar aims.



David Rockell | **President**
Sophie Henderson | **Vice-President**
David Ryan | **Secretary/Treasurer**

Committee Members:
Stephen Epstein, Lorraine Wong, Georgia Naish, Cameron Burton

NZEA's vision is for everyone in New Zealand to recognise the value of Esperanto as an international language.

NZEA is one of the oldest Esperanto associations in the world, and is responsible for promoting Esperanto in New Zealand, providing learning material, and answering queries about the language.

New Zealand Esperanto Association

www.esperanto.org.nz
esperantonewzealand@gmail.com
021 543 449

“Esperanto?”

Have you picked up this magazine by chance and are wondering what language it is? It might look a bit like Spanish, but it’s actually Esperanto.

What is Esperanto?

Esperanto was specially planned and created as a neutral second language for people all over the world. So, if you come across someone from, say, Finland, you wouldn’t have to speak Finnish and they wouldn’t have to speak English.

Originally developed in the 1880s, Esperanto is currently experiencing a resurgence, with more and more people discovering and learning it online. It’s spoken in over 100 countries and there are thousands of Esperanto clubs worldwide.

Esperanto is much easier to learn than any national language, because it was designed that way. It’s completely phonetic, and its grammar is logical and regular.

You can use Esperanto for travel, information, friendship, hobbies, and even business. The World Esperanto Association publishes a list of names and addresses of people who are happy to have you stay with them for free if you speak Esperanto.

The internet makes it easy to connect to Esperanto speakers in any country. Google, Facebook, Firefox and Linux all support Esperanto. There’s an Esperanto version of Wikipedia, which has over 400 000 articles (more than the Danish version, for example).

Isn’t English enough?

National languages like English give an unfair advantage to their native speakers. People who have studied English for over ten years still feel at a disadvantage when talking with a native speaker.

Interested? See the contact details on the inside back cover.

